# *La prezidento Raúl Castro akceptis en Havano sian homologon el Kenjo.*



La prezidento Raúl Castro akceptis en Havano sian homologon el Kenjo.

Havano, 16 mar (RHK) La kuba prezidento Raúl Castro, akceptis en tiu ?i urbo sian homologon el Kenjo, Uhuru Kenyatta, kiu plenumas oficialan laborviziton en Kubo.

Post la oficiala ceremonio kaj la akcepto, amba? ?tatestroj plenumis  konversacian programon kiu celas plifortigi la reciprokajn kunlaborajn rilatojn ekzistantajn inter amba? landoj .

Anta?e, Kenyatta oma?is la nacian heroon de Kubo, José Martí en la memorialo situanta en la Placo de la Revolucio.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/157631-la-prezidento-raul-castro-akceptis-en-havano-sian-homologon-el-kenjo

# Radio Habana Cuba